Theodor Fontane,

En la ĝardeno

tradukita de Manfredo Ratislavo

La framboj per altaj siaj
tigoj disigis nin,
sed tra l' foliaro niaj
manoj mem trovis sin.

La heĝo per alto sia
ne povis malhelpi ĝin:
mi metis la berojn al via
buŝo kaj kisis vi min.

Se irus tra la ĝardeno
ankoraŭfoje vi,
volonte je via reveno
atendus dum horoj mi.

Traduko de la Germana poemo "Im Garten" de THEODOR FONTANE *(Teodoro Fontano, ∗1819-12-30 – †1898-09-20) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1998-07-19.*

MR-313-1a / Arg-112-224 (2003-12-30 21:28:41)